

ALEKSIS KIVI



La fianĉiĝo
—
Lea

808.2
K62f

ESPERANTO-INSTITUTO DE FINNLANDO

LIBRARO
VILHO SETÄLÄ

ALEX S H

KANTO-ISTIT



FINNA BIBLIOTEKO

ESPERANTA • N:o 3

Aleksis Kivi

La fianĉiĝo
Lea

Helsingfors
Eldona akcia societo Otava



FINNA BIBLIOTEKO ESPERANTA N:º 3

ALEKSIS KIVI

LA FIANĈIĜO

LEA

DU TEATRAĴOJ
KUN PERMESO TRADUKITAJ

808.2
K.62+
FIA
1920

de Esperantistoj
Av. 13 de Maio, 47
S/L 208
Rio de Janeiro



ELDONA AKCIA SOCIETO OTAVA
HELSINGFORSO, FINNLANDO

UNIVERSITATO DE GEARÁ
ESPERANTO-CENTRO DE INTERNACIA KULTURO
BIBLIOTEKO
FORTALEZA

PRESEJO DE K. F. PUROMIES A. S. HELSINGFORSO 1920.

LA FIANĈIGŔO

(KIHLAUS)

UNUAKTA KOMEDIO

TRADUKIS EL FINNA LINGVO

HILMA HALL

UNIVERSITATO DE OARÁ
ESPERANTO-CENTRO DE INTERNACIO BOLIVIA
BIBLIOTEKO
FORTALEZA

sinjora, tiel galanta, unuvorte, tiel senprudenta, kiel Eva. Malpli sufiĉus por simpla filino de nutrodingito. Ĉu jena parolo konvenas al vulgara homo: »Kie kreskas la kartofloj, ĉu tere aŭ sur arbo?» Ŝi celis terpomojn, vi atentu. Tiel ŝi demandis vilaĝanon en la foirejo. Kaj la jena demando: »patro-karulo, kiu estas la bela birdo, kiu saltadas en la korto?» Ŝi nome ne plu rekonis la pignon reveninte al la kamparo. (Ekridas, sed nur iomete.) Nu, eble ŝi ne konis la birdon. Tion mi ne volas garantementi. Sed atentu, kiel vigla la homido estas vidi lignereton en la okulo de sia frato kaj ne la trabon en sia propra okulo. Sed mi amas mian kolegon kaj ne dezirus al li doman punkrucon kian, mi timas, li nun ricevos.

JOZEFO. Certe, tute certe nova vivmaniero nun komenciĝos en ĉi tiu dometo.

ENOKO. Mi timas, mi tre timas tion. Eva ree malamiĝis kun siaj sinjoroj kaj en sia kolerego ŝi faras tiun ĉi paŝon, sed ha! kiam pasis la mielmonato, ŝi sentos repenton kaj ree sopiros al siaj sinjoroj. Ĉar Abeloo ne posedas tiajn ceremoniaĵojn, tian brustostreĉadon kaj imponan sonoron de voĉo, kiujn Eva kutimiĝis vidi kaj aŭdi kaj kiuj flamigas la okulojn de malserioza knabino tiel dolĉe. — Abeloo estas iom, iomete naiva, sed bonkora, tute bonkora homo.

JOZEFO. Bona estas eĉ lia nomo.

ENOKO. Sed lia amema koro lin kelkfoje kondukas al aferoj, kiujn sekvas pento. Mi kontraŭe estas tia serioza lignoŝtipo, vera segstablo. (Iomete ekridas.) Kio bolas en la poto?

JOZEFO. Tie bolas kolbaspecoj, grio, akvo kaj salo.
— Ĉu vi aŭdis ĉarbruon?

ENOKO. Efektive! Ili venas. (Aparte.) Ja, ja, knabinjo mia; vi tien ĉi alpaŝas, sed mi ja scias, ke vi ne faras tion instigita de pura, kora amo. Mian nukon mi riskas veti, ke vi avide kaj insiste petis edziĝon de viaj sinjoroj, sed ĉar tio ne efektiviĝis, vi nun indigne fumos muskon anstataŭ sinjora tabako. (Abelo kaj Eva, ambaŭ portante pakajon en la mano, eniras.)

JOZEFO (ne ĉesigante la movadon de la trulo, rive-rencas profunde).

ENOKO. Estu bonvenaj, ĝefianĉoj!

ABELO. Ni dankas vin. Vi estas tie ĉi ĝuste bezona. — Sidiĝu, Eva. — Ĉu Jozefo ion rakontis al vi?

ENOKO. Kelkvorte.

ABELO. Nun mi ja havas almenaŭ tiun, kiu lavos mian ĉemizon. — Sidiĝu, sidiĝu, Eva.

EVA (aparte.) Tia ĉambraĉo! Nesto de gufo! (Abelo elprenas el la pakajo sukerujon kaj metas ĝin sur la tablon.)

ABELO. La sukerujo tamen estas sendifekta. Sciu, Enoko, ke ni estis skuataj de terura muelilo, mi kaj Eva. Ho, la malpiaj sinjoroj!

ENOKO. Ili sendube agis kun vi fiere, arogante?

ABELO. Mi estas danka, ke ili ne bastonis min.

ENOKO. Nura envio.

ABELO. Ne konvenis, nome, eniri. En la korto starante mi akceptis la aĵojn de Eva. Sed kiam ni fine estis pretaj ekveturi kaj sidis en la ĉaro, ekdivenu, kion ili faris?

ENOKO. Abomenan petolajon, mi bone povas imagi.

ABELO. Alvenis knabeto, laŭ ordono de la sinjoroj, kvazaŭ por ordigi la vostrimenon de l'ĉevalo, sed la malbenito enŝovis brulantan tindropecon sub la voston de Brunulo, kaj samtempe unu el la sinjoroj moke sendis post ni adiaŭan salutpafon. Kara kolego, imagu per kia kapturniga rapido ni lasis la domon. Brunulo kuregis freneze, piedbatis kaj kuris kun klinitaj oreloj. Ĉu mirinde, se ni ambaŭ, Eva kaj mi, kriegis plengorĝe en nia mizero?

ENOKO. Neniel mirinde, sed mirinde estas, ke vi nun staras ĉi tie kaj rakontas pri via kolrompanta aventuro. Estu dankema, ke vi ne kuŝas en drenajo kun la plandoj supren.

ABELO. La sorto favoris nin. La tindropeco fine forfalis kaj Brunulo iom post iom trankviligis sian kuraĉon, kaj kun egale sendifektaj ostoj kiel antaŭe ni sidis en la ĉaro, kvankam batantakore.

ENOKO. Ho, la kruelaj sinjoroj! la terureguloj!

ABELO. Nu, diru alion! Mi nur miras, ke Eva tiel longe eltenis kun ili. Ke vi ne pli frue faris ĉi tiun manovron, Eva?

EVA. (Aparte). Efektive, vi motacelo! Donu Dio, ke mi neniam faris ĝin. Kia frenezo, kia frenezo de mi, lasi la sinjorojn kaj veni ĉi tien sub la torftegmenton!

ABELO. Sed kial la fianĉino estas tiel silenta?

ENOKO. La ordinara malgajeco de fianĉino ĉe translokiĝo al la edza hejmo.

ABELO. Kaj nia afero ja ne estas ankoraŭ tute formale sankciita. Sed ni profundiĝu en la aferon; ni faru

tion, kio tamen estas farota, ĉar pli bone estas en stomako de urso ol inter ĝiaj dentoj. Vi scias, kiu pia kaj grava ceremonio ĉi-momente okazos tie ĉi.

ENOKO. Laŭ mia kredo mi scias.

ABELO. Fianĉiĝo, laŭleĝa fianĉiĝo, kaj pro tio mi invitis vin ĉi tien. Komencu, Enoko. Sed unue eta parolado!

ENOKO (tusas). Ĉar... ĉar ni nun estas ĉi tie kunvenintaj por kunigi du animojn, nome la tajlormajstron de la komunumo, Abelo Simeonido, kaj la fraŭlineton Eva Matiidino...

ABELO. Ŝia familia nomo efektive estas Helander.

ENOKO. Kaj la fraŭlineton Eva Helander, por kunligi iliajn sortojn tiel ĉe prospero kiel ĉe malprospero. Kaj ĝi ne estas ia maŝnodo, tute ne, sed nemalligebla duobla nodo, kiun nur la falĉilo de la morto povas disrompi. Bone memoru kaj avare en viaj koroj konservu la devojn de geedzoj, ambaŭflanke. La edzo nome devas esti la kapo de sia edzino; tio estas lia devo, kaj la edzino estu la plimalforta ilo de sia edzo; jen estas ŝia devo. Kaj tiel iru, manon en mano, je la nomo de Dio, dum kantado de ĝojbirdoj, ĝis la profundo de la tombo. — Nu, kion vi mem diras, Abelo?

ABELO. Nenion mi havas por diri.

ENOKO. Donu do la ringon.

ABELO. Jen ĝi estas.

EVA (aparte). Kion fari? Ĉu mi akceptu la ringon? Ve al mi, frenezulino!

ENOKO. Abelo donas ĉi tiun ringon al vi, Eva. (Donas la ringon al Eva.) Jen. (Kantas preĝejmaniere.)

Diablajn intrigojn . . . Estas ja laŭ via deziro, Abelo?

ABELO. Daŭrigu, daŭrigu!

ENOKO kaj JOZEFO (la lastenomita senĉese movante la poton, kantas): Diablajn intrigojn vi forigu . . .

EVA. Pro kio vi kantas! Fermu viajn buŝojn, estos pli bone.

ABELO. Ŝŝt! La fianĉino ne permesas kantadon.

ENOKO. Hmm! Sed kantado duoble valoras legadon.

EVA. Vere! Streĉi kolon kaj krii kiel koko.

ENOKO. Ĉu koko?

EVA. Neniun kantadon, mi diras!

ABELO. Ne, ne, ĉar estas via volo.

ENOKO. Ŝi estas, kiel mi diris, kolerema.

JOZEFO (aparte). Certe, tute certe nova vivo komenciĝos en ĉi tiu domo.

ABELO. La kantadon ni lasu ĉi tiun fojon. Nun, Eva, brave fariĝu mia familiano kaj orientu vin en mia domo.

EVA. En tiu homnesto. (Momenta silento.)

ABELO (aparte). Homa nesto. Iom rigore dirite. (Laŭte.) Certe mia domo estas malnova, sed ĝi estas anstataŭigota per nova kaj pompa.

EVA. Antaŭ ol ni posedos novan, ni estos en embaraso.

ABELO. Ni ne estos longe en embaraso, se ni ne vivos malpli prudente ol ĝis nun, Eva mia.

EVA. Nun mi rememoras la ĉambrojn, kiujn mi lasis. Kia diferenco! Ha! El kastelo en kavernon mi transloĝiĝis, de la ĝajaj sinjoroj mi foriris, malsaĝulino, kaj enrampis en barakon de tajloro. Kia diferenco, ho, kia diferenco!

ENOKO. Iamaniere la diferenco estas granda, sed iamaniere . . .

EVA. Fermu vian buŝon, korniko.

ENOKO (aparte). Hajdjajdjaj, kian koron la homino havas!

JOZEFO (aparte). Certe, certe, novaj manieroj nun komenciĝos.

ABELO (aparte). Ŝi komencas kaprici kaj ŝajnas eĉ penti sian entreprenon kaj mi, malfeliĉulo, enamiĝis en ŝi tiel profunde. Sed mi sciigos al ŝi, ke mi posedas eĉ monon, kvardek talerojn. Sufiĉe bela sumo! (Laŭte.) Certe mi ne estas riĉa, tute ne, kaj multe da mono mi ne posedas, nur kvardek talerojn.

ENOKO. Kvardek taleroj en la poŝo! Pro tio oni ne bezonas iri kun vosto inter kruroj.

ABELO. Nenio fanfaroninda, nenio. Nu, nu, iom mi ja posedas. Estu kiel ajn, sed kedu min, Eva, vere vi ne metis vian manon en koton, kiam vi elektis majstron Abelo kiel vian edzon.

EVA. Tiam mi sidiĝis en la sledon de diablido. Mi ja eliris el mia hejmo kvazaŭ mi veturis rekte al geheno. Tio jam kaŭzis pripensojn al mi. Pro kio, pro kio do ili metis brulantan pecon de tindro sub la voston de Brunulo?

ENOKO. La malpiuloj!

ABELO. La friponoj! Se ni apelacius al leĝo, la diablo ilin prenis. Brulantan pecon de tindro! Kaj plue ili pafis!

ENOKO. Hajdjajdjaj!

ABELO. Mi koleriĝas. Vidu, de kiaj monstroj vi

patrino? Ĉu tiel la katekisto? Kiam vi lastfoje komuniĝis? Mi nur demandas.

EVA. Senhontulo, ĉu tio koncernas vin?

ENOKO. Mi ja estas via kunhomo kaj mia devo estas, kiel kristano, peni rektigi vin, aĉulino.

EVA. Sed mi volus vin kurbigi, milfoje kurbigi kaj ĵeti eksteren. Vi ĉefmizerulo, senhonta tajloro, vi ja frenezigas min!

ENOKO. Jen, jen, oni vidas kiom la afero agacas, kaj mi pikis profunde kaj senindulge. Jes, tiel mi kutimas. Mi ĉiam atakas sentime, kviete kaj rekte kvazaŭ perko. Kaj vian vivkonducon sen pieco, vian malpian vivmanieron mi severe atakos, se mi ne vidos pliboniĝon ĉe vi.

EVA. Sed mi daŭrigos mian vivadon, jes mi tamen daŭrigos. Kion vi povas fari al mi?

ENOKO. Mi raportos al la preposto.

EVA. Vi faros tion? Ha! Plumbon vi ricevos en viajn kruraĉojn de miaj sinjoroj.

ENOKO. Ankaŭ mi posedas pafilon.

EVA. Kiu eĉ paseron ne mortigas.

ENOKO. Eĉ sorĉistinon ĝi mortigos, eĉ demonhavantan knabinon.

ABELO. Ne interinsultu, ne disputu, kaj vi, Enoko, volu ne plu mallaŭdi Evan, ŝi ja estas kvazaŭ mia fianĉino; kaj la proverbo diras: el unu osto konsistas la kaprokorno, la flankoj kaj pinto kunestas.

EVA (aparte). Via fianĉino!

ENOKO. Veron mi diras, kaj estu ĝi utila al ŝi. Mi

kutimas, kiel mi diris, ĉiam iri antaŭen, kviete, sentime kaj rekte kiel la perko (flaras tabakon).

ABELO. Nun mi komprenas, kion Eva celis per tiuj kvazaŭ iom nesinceraj vortoj: provi mian karakteron. Sed ŝi pardonu mian ofendsentemon; ĉar ĝin, Dio helpu, ni trovas ĉie, kaj ĝi estas malĝojiga eltrovo. Ofte mi pensas, konatiĝante kun novulo: jen bravulo inter bravuloj. Sed interrilatu nur kun li iom daŭre, kaj baldaŭ li ruĝiĝas kvazaŭ koko kaj montras malbonhumoron; kaj tio estas tre malĝojige. Mi atentis diversajn aferojn de la tablorado de l' mondo, kaj metiisto ofte valoras magiiston. — Ha, vere la kanajlino elpremis ŝvifon sur mia frunto per sia ekzameno. (Prenas naztukon el sia poŝo sed ekfaligas samfoje la sukerujon de Eva de sur la tablo sur la plankon, kaj ĝi dispeciĝas.)

EVA. Dio gardu kaj savu!

JOZEFO. Ho ve, kio nun okazis al la majstro!

EVA. Ve! Li dispecigis mian sukerujon!

ENOKO (aparte). Malfeliĉa Abeló! Jen li staras kvazaŭ svenonta kokino kaj ruĝas kiel plenluno en serena vespero.

EVA. La vesperto! Frakasi mian tute-vere-porcelanan sukerujon, karan nomfestan donacon de miaj sinjoroj. Pagu ĝin, homo, pagu ĝin tuj, pigo, fipigo, garolo!

ENOKO (aparte). Haj djaj djaj. Kia galo, kia galo!

ABELO. Efektive! Vi mokas min kaj fakte ne intencas fariĝi mia edzino?

EVA. Diablino estu via edzino.

ENOKO (aparte). Tra la korpo mi tremas aŭdante ŝiajn vortojn.

ABELO. Enoko, demandu ŝin, dum Jozefo atestas, ĉu ŝi volas mian kiel edzon.

ENOKO (tusas). Mi demandas vin, Eva Matiidino Helander, ĉu vi havas sinceran intencon edziniĝi kun Abelo Simeonido?

EVA. Mi ne volas lin; mi reiros al miaj sinjoroj (momenta silento).

ABELO (aparte). Ĉu vere!

ENOKO (aparte). Kia turmentistino!

ABELO. Demandu de ŝi ankoraŭ foje.

ENOKO. Mi demandas vin, Eva Matiidino Helander, ĉu vi havas sinceran intencon edziniĝi kun Abelo Simeonido?

EVA. Mi ne volas lin, mi ja diris, eĉ ne colon de li (longa silento).

ABELO. Demandu de ŝi ankoraŭ trian fojon.

ENOKO. Mi demandas vin, Eva Matiidino Helander, ĉu vi havas sinceran intencon edziniĝi kun Abelo Simeonido?

EVA. Mi lasas lin a koboldo (piedbatas kolere la plankon). Mi ne volas lin, ne volas, ne volas; ne, ne! Ĉu viaj oretruoj nenion perceptas, vi sorĉitaj viroj? (Silento. El la fajrejo aŭdiĝas brueto.)

ABELO. Knabo, ĉu vi disverŝas Dian donacon en la cindron tie! (Skuas Jozefon je la kolumo.)

JOZEFO. Majstro!

ENOKO (detenante Abelon). Kvietiĝu, Abelo, kaj pardonu la akcidenton.

ABELO. Jam alvenis horo de furiozol!

EVA. Repagu mian belan sukerujon.

ABELO. Vian ujon! Ĉu venis fino de mondaĝo? Ĉu liveras siajn mortintojn la tero kaj la maro, la morto kaj la fajreranta infero? Ho, kia tago!

EVA. Ve al mi, malsprita infano!

ABELO. Vi malĉasta, redonu mian ringon!

EVA. Ha! jen, knabo mia (Abelo ŝetegas la ringon kontraŭ plankon).

ENOKO. Nu, nu, frato mia (prenas la ringon).

ABELO. Homo, kial vi tromplogis min por alveturigi vin?

EVA. Kial vi lasis vin trompi?

ENOKO. Haj djaj!

ABELO. Tiamaniere!

EVA. Veturigu min en la eterna momento la saman vojon returnen, tajloro!

ABELO. Vere! — Jes, jes, se vi pagas per mono, se vi tuj metas du markojn sur la tablon. Jozefo vin veturigu. — Du markojn donu, tuj!

EVA. Ne eĉ obolon. La sukerujo!

ABELO. La sukerujo estu pago por la veturigo ĉi tien, kaj reen vi marŝu kun la pakaĵoj en la manoj; tio estu dirita.

ENOKO. Mi tre volus, efektive mi volus vidi la revenon de Eva al siaj sinjoroj. Certe mi tiam vidus hundinon kun vosto inter kruroj.

EVA. Ho! Tajloro Enoko, pro tio ne zorgu. Unue iom da moko de la sinjoroj, al kio mi respondos per kelkaj larmoj, sed antaŭ ol vesperiĝos, la komuna korgojo atingos la plafonon. Jen ĉio!

ENOKO. Ho, la virina karaktero! Miraklo inter ĉiuj

mirakloj. Eterna konfuzo de ora sunlumo kaj malluma nubaro, galimatio sen komenco, sen fino. Ĉu mirinde, ke ni neniam komprenos tian beston?

EVA. Tuj jungu la ĉevalon, Abelo, por ekveturo.

ABELO. Vi arogas?

ENOKO. Por ekveturo! Divenu, kiam veturigon vi meritus? Diablo! se ni juste agus, vian kapon mi ĉirkaŭprenus, Jozefo tenus viajn piedojn, dum Abelo mem vin bone regalus el vira mano.

EVA. Abelo!

ABELO. Eble vi opinias, ke mi ne kapablas doni bastonadon? (Eva komencas kunligi siajn aĵojn, kantetante.) Metu la manĝon sur la tablon, Jozefo. Ni ekmanĝu, sed ŝi foriru. (Jozefo alportas manĝaĵojn.) Ŝi estas malsincera homo.

ENOKO. Birdo de malfeliĉo.

ABELO (aparte). Malfeliĉa tago! Mia koro sin sentas kvazaŭ dispecigita. — Bone, Jozefo, venu manĝi kun ni. Ni manĝu, Enoko.

ENOKO. Jes, ni manĝu. (Abelo, Enoko, kaj Jozefo sidiĝas kaj ekmanĝas.)

ABELO. Multon oni spertas en ĉi tiu mondo.

ENOKO. Nenion diru.

ABELO. Eva, Eva, kion mi faris al vi, ĉar vi tiel malbone agis kun mi?

ENOKO. Tute ignoru ŝin.

ABELO (aparte). Ŝi nur kantetas.

EVA. (Eliras portante siajn aĵojn.) Adiaŭ!

ABELO. Adiaŭ!

ENOKO. Fine foriris la fiulino. Sed vi devas ne lasi

la aferon. La senhonta tromplogo de la knabino kaj la abomena ŝerco de la sinjoroj estu serioze punataj. Vi instruu ilin moktrompi honestan viron!

ABELO. Mi emus ion fari, sed ne estas bone riski. Ili vagas en arbaroj kun pafiloj kaj povos min mortpafi; ĉar pripensu, la plej ega timulo portanta pafarmilon povas en momento mortigi la plej kuraĝan heroon, kiu estas sen armilo.

ENOKO. Ĉu ili pafus? Ne tiel sencere monie oni faras murdon.

ABELO. Kiu garantias pri tio? La sinjoroj havas malican koron, vi renkontas ilin en arbaro, ili trapafas vin kvazaŭ hundon. Kion fari?

ENOKO. Sed mi ne emas cedi, mi ne toleras ilian vivmanieron, ilian malpian vivon kun tiu knabino. La preposto devas esti informata pri tio.

ABELO. Mi atentigas vin ankoraŭfoje: ili povos vin mortpafi.

ENOKO (ekkolere). Ili mortpafu! Timo ne helpas en la mondo.

ABELO. Tiel vi diras.

ENOKO. Mi volas ĉesigi tiun tetroludon, mi diras.

ABELO (aparte). Sed kial fariĝas la rondo de miaj pensoj tiel konfuza? Mi timas, mi timas ion. — (Laŭte.) Ĉu ĝi estis Eva de la sinjoroj? Mi enamiĝis en ŝi profunde. Ĉu ĝi estis Eva de la sinjoroj?

ENOKO. La sama malindulino. Sed kial vi tion demandas? Ĉu vi ne havas ŝin en sufiĉe freŝa memoro?

JOZEFO. Ho! mizero, mizero! (Ili stariĝas de la tablo.)

ENOKO. Pro diablo, ne lasu la malĝojn ekregi, Abelo.

JOZEFO. Ho, tago de ploroj! Atentu, kiel la okuloj de mia majstro ruliĝas. Li estas perdita.

ENOKO. Ne, Abelo, ne konvenas tiel profunde mediti kaj malĝoji. Gardu vin! Alie mi donos al vi vangfrapon.

ABELO. Nenia danĝero ĝis plue. Sed tre mia koro premiĝas, kiam mi rememoras la altbrustan junulinon, kiu estis al mi donita, sed tuj ree forprenita je la nomo de la Sinjoro.

ENOKO. Al infero la virinaĉon!

ABELO. Nu, nu, nu, nu!

ENOKO. Vi konsideras tion domaĝo?

ABELO. Mi jam sentis min preskaŭ edzo, sed efektive mi estas maljuna fraŭlo, kies vivo nun ŝajnas al mi simila al tiu de blato dormetanta en la murfendo ĉe lastaj radioj de subiranta suno. Ho, mia frato! Veturante kun ŝi kaj vidante muŝfunĝon ĉe la pordego de la ĉevalpaŝtejo, jen kion mi pensis: Kiam en septembra arbaro ni kune, sakojn sur la dorsoj, kolektos fungojn, tiam ni ĝuos plezurojn de la vivo. Sed nun, ĉia espero forestas kaj konsolon mi ne trovas.

ENOKO. Multan konsolon, amiko mia, multan. Maljuna fraŭlo festos sian edziĝon post la morto ĉe dancado de steloj. Tie, jes, tie li ricevos edzinjon, sed la edzoj devos nur alrigardi.

ABELO. He! Kiel ekzemple Karlo Karppila.

ENOKO. Ĝuste tiel!

ABELO. Parolu, parolu ion gajan, por ke ne okazu malbone al mi.

ENOKO. Nenio malĝojinda, nenio. Kiam aliaj havos vesperon, al ni estos roza mateno; la kukolo kantos kaj fringoj ĉirpos, sub niaj piedoj estos la herbejo de feliĉego kaj super ni la eterne blua ĉielo, kaj la anĝeloj trumpetos. — Ĝuste tiel, ĝuste tiel. — Sed unu bonega rimedo! La leŭtenanto de Viitamäki, kiu havas teruran galon; kiam li fariĝas fulgonigra vizaĝe pro kolero kontraŭ siaj najbaroj kaj timas la cerbon elruliĝi el sia ĝusta loko, tiam li ordonas al sia filino ludi fortepianon kaj mem li ekdancas kelkrondon da valso en sia salono, kaj tuj lia kolero kvietiĝas. Ni provu la saman metodon. Jozefo, ekkantu: Dum kuroj venis jam; kantu, knabo, kaj piedfrapu la takton.

JOZEFO. Mi ne povas kanti nun!

ABELO. Pro kio vi ne povas? Vi ja scias la kanton.

JOZEFO. Sed ploro sufokas mian voĉon.

ABELO. Kantu, kaj ni dancos. Kantu, Jozefo, alie min kaptos kapturino, kapturino. Hih!

JOZEFO. Ho ve!

ENOKO. Pro dio, kantu tuj!

ABELO. Gardu vin, por ke mi ne prenu la mezurbastonon. Kantu: Dum kuroj venis jam.

JOZEFO. Mi kantas, majstro.

ENOKO. Kaj piedfrapu. (Dum kantado de Jozefo, Enoko kaj Abelo valsas kun tre kurbaj genuoj kaj svingas la kunmetitajn manojn.)

JOZEFO (kantas piedfrapante):

Dum kuroj venis jam
faris loĝejojn jam

kaj petis brandon, bieron al tabl',
faris loĝejojn jam,
faris loĝejojn jam,
kaj petis brandon, bieron al tabl' . . .

MALLONGIGOJ.

En la Finna Nacia Teatro oni kutimas prezenti la teatraĵojn La Fianĉiĝo kun kelkaj mallongigoj, kiujn ni citas sube [inter krampoj]. En la Esperanta prezentado dum la Finnlanda Foiro 1920 oni faros same.

Paĝo 7: JOZEFO. Mi nek admonis ... [sed aliloke ... okulojn al li.] — p. 7: ENOKO. Ĉi tiu edziĝo ... [Pri tio ... la pekojn!] — p. 9: ENOKO. Efektive, ili venas. [(Aparte) ... tabako.] — p. 9: [ABELO. Mi estas danko ... ENOKO. Nura envio.] — p. 11: ŝanĝo en ordo: ENOKO. Donu do la ringon. ABELO (serĉas la ringon en ĉiuj poŝoj). EVA (aparte). Kion fari? Ĉu mi akceptu la ringon? Ve al mi, frenezulino. ABELO (donas la ringon al Enoko). Jen ĝi estas. ENOKO. Abelo donas ... — p. 12: [EVA. Antaŭ ol ... ABELO ... Eva mia.] — p. 13—14: [EVA. Tiam mi sidigis ... ENOKO ... ABELO ... ENOKO ... ABELO ... honesta viro.] — p. 15: [ABELO. Jes, jes, mi memoras ... EVA ... tio estis bele.] — p. 15—16: ENOKO. Kun korĉagreno ... [Ĉu vi scias ... la katekisto.] — p. 16: [ENOKO. Jen, jen oni vidas ... EVA ... ENOKO ... EVA ... ENOKO ... EVA ... ENOKO ... demonhavantan knabinon.] — p. 17: ABELO. Nun mi kom-

prenas... [Ofte mi pensas... magiiston.] — p. 17:
[ENOKO. Tra la korpo... ŝiajn vortojn.] — p. 19:
ABELO. Vian ujon... [Ĉu liveras... infero.] Ho,
kia tago! [EVA. Ve al mi, malsprita infano. ABELO.]
Vi malĉasta... — p. 19—20: [ENOKO. Mi tre
volus... EVA... ENOKO... tian beston.] — p.
20—21: ENOKO. Fine foriris la fiulino. [Sed vi
devas... ABELO... ENOKO... ABELO... ENO-
KO... ABELO... ENOKO... ABELO... ENO-
KO... tetroludon, mi diras.]



LEA

TEATRAJO EN UNU AKTO

TRADUKIS EL FINNA LINGVO

ILMARI EKSTRÖM

LA PERSONOJ:

ZAKEO, estro de impostistoj en Jeriĥo.

LEA, lia filino.

ARAM, juna sadukeo.

JOAS, fariseo.

RUBEN, impostisto.

La agado: en Palestino en la urbo Jeriĥo dum la vivo de Kristo.

Rajto de prezentado sekvas la aĉeton de ses ekzempleroj de ĉi tiu libro.

La ĉambro de Zakeo; tra la malfermita pordo estas videblaj malproksima montaro kaj sub la montoj altaj palmoj. Zakeo sidas ĉe tablo kalkulante siajn monerojn el kesteto sur la tablo.

UNUA SCENO.

ZAKEO. Poste RUBEN.

ZAKEO. Mil, dumil, trimil denaroj. Jen trimil denaroj. (Ekfermas subite la kesteton.) Ruben. Mi ja forgesas mian figĝardenon. Ruben! (Ruben venas.)

RUBEN. Kion vi deziras, sinjoro?

ZAKEO. Unu fojon ĉirkaŭiru mian fig- kaj balzamĝardenon kaj rigardu, ĉu ĉio estas kiel devas esti. Memoru: la fruktoj pendas maturaj, la barilo estas malforta kaj la ŝtelistoj estas multaj. Faru, kiel mi diris.

RUBEN. Mi faros tion tuj. (Iras.)

DUA SCENO.

ZAKEO (sola).

(Malfermas denove la kesteton kaj kalkulas.) Trimil, kvarmil, kvin mil denaroj. Jes, kvin mil denaroj kun kelkaj malgrandaj moneroj, jen mia tuta riĉaĵo en mono. Riĉa mi estas, sed kial ne pli riĉa? Kvinmil denaroj;

JOAS. Malpli ol Jehovon, pli ol min mem.

ZAKEO. Kaj pli ol mian oron?

JOAS. Kion vi demandas?

ZAKEO. Pri unu afero mi demandas vin. Vidu, se nun mia malbontago venus, atakante min ventege kiel antaŭe la malfeliĉa tago de Job, forprenante de mi ĉion, kaj mi starus kun bastono de almozulo en mia mano, — diru, ĉu vi tamen edziĝus kun mia filino?

JOAS. En la nomo de Elokim, mi farus tion.

ZAKEO. Saluton al vi!

JOAS. Mia amo al ŝi estas ne dezirego de oro, sed pura raviĝo, kiel antaŭe en la koro de Jakobo al Raĥel.

ZAKEO. Mi volas kredi tion kaj estas preta prepari la edziĝofeston.

JOAS. Ankoraŭ unu demando. Kiam mi edziĝos kun via filino, kiel granda estos ŝia doto?

ZAKEO. Dumil denaroj.

JOAS. Ne, trimil.

ZAKEO. Dumil, ne eĉ monereto pli. Sed post mia foriro al la praavoj vi ricevos ĉion, estu kontenta.

JOAS. Mi konsentas atendi, kiam mi nur havos vian filinon. Sed jen estas la nodo.

ZAKEO. Kiun malligas la patra aŭtoritato.

JOAS. Ŝia koro estas kontraŭ mi malvarma, sed kontraŭ Aram tute dolĉa.

ZAKEO. Sed vi ŝin ricevos, kaj Aram ricevu baton de mia bastono, se li ankoraŭ unu fojon kuraĝas eniri en mian domon. Multajn kaŭzojn ne akcepti lin mi havas. Vidu, li estas sadukeo, kaj ankaŭ de malnobla deveno, do ankoraŭ pli malestiminda ol mem la estro de

sadukeoj. Li estas duone greko, legas la leĝon de Moseo egale malserioze kiel la malpurajn skribaĵojn de nacioj. Studadi fremdajn erarigajn skribaĵojn: punir da faro!

JOAS. Ŝtonmortigon meritas, ŝtonmortigon.

ZAKEO. Kaj kia li plie estas? Malriĉa rato. Kaj tio estas el la paragrafoj la plej malbona. Ĉu mi donus al li mian filinon? Neniam, tiel longe kiel vivas la Dio de Izraelo.

JOAS. Mi dankas vin. Sed la aferon ni firmigu ĉe atestantoj.

ZAKEO. Tiel okazu, kiam venos mia filino.

JOAS. Kie ŝi restas? Eble ĉe tiu malbeninda sadukeo, ĉe lia ruza patrino.

ZAKEO. Vi eraras. Nun ŝi forestas laŭ mia permeso; sed mi pentas, ke mi lasis ŝin iri. Jam hieraŭ ŝi iris kun amikino, por vidi la profeton, vidi liajn miraklojn, pri kiuj oni senfine rakontas. Fariĝis ja — vi certe tion scias — en nia urbo hieraŭ granda krio kaj famo pri tiu mirinda viro, tiu nazaretano, kiun oni nomas profeto, eĉ Mesio.

JOAS. Kia malsaĝaĵo. Esploru la skribaĵojn: el tiuj vi trovos firman ateston ke ne venos profeto el Nazareto, tiom malpli Mesio, la promesita fianĉo de Izraelo, la reganto super la domo de Davido.

ZAKEO. Mi diras: tiel rakontas la popolo.

JOAS. Tiu-ĉi popolo, tiu-ĉi mizera amasaĉo, kiu ne konas la leĝon kaj la profetojn, ĝi estu malbenita. Malbenita estu la senprudenta popolaĉo. Ha, kial vi lasis ŝin en tiun perfidan fluon?

ZAKEO. Mi esperas tamen . . .

JOAS. Silentu. Venis la horo de la sepa preĝo. (Genufleksas kaj preĝas.) Mi levas miajn manojn al la supera alto kaj dankas vin, Dio de Abrahamo, Dio de Isako, Dio de Jakobo kaj Dio de niaj antaŭuloj. Mi dankas vin, ke mi ne estas rabisto, nek mensogisto, ke mi ne sidas en kunsido de blasfemantoj, sed iradas malproksime de la vojoj de malpiuloj. Jen mi estas kiel figarbo, plantita apud akvaj torentoj, donanta sian frukton en sia tempo kaj kies folio ne velkas. Mi fastas dufoje en semajno, unufoje en semajno mi donacas moneron en la monkeston kaj ĉiusabate vin laŭdas, kantante en la sankta fumo de la templo. Sinjoro, kiu servas pli fervore al vi en la lando de Benjameno, kaj kiu do estas pli inda ke bone okazu al li, tiel sidante kiel irante, tiel dormante kiel maldormante? Sinjoro, gardu Joas'on ĉiam, sed liajn malamikojn ŝetu en la fajron de infero! Auskultu mian preĝon, Dio de miaj prapatroj, estro de militistaroj, Dio Cebaot. (Stariĝas. Intertempe Zakeo forportis la kesteton kaj ordigadis iomete en la ĉambro. — Lea eniras.)

KVARA SCENO.

La antaŭaj. LEA.

ZAKEO. Mia filino, vi restis pli longe ol estis mia permeso.

LEA. Ho, mia patro. Flugante pasas la tempo, kiam nia koro estas okupata de ĉielaj mirindaĵoj.

ZAKEO. Via koro estas en brulo kaj flamoj, mi kredas.

LEA. Ho! sankta ŝajnas al mi la aero, kiun mi spiras, sankta la vento en nia figĝardeno.

ZAKEO. Ĉu ankaŭ vi jam frenezetiĝis?

JOAS. Kion mi diris? Ha, ekscito jam regas.

LEA. Joas, ne diru tiel, kaj vi, mia patro amata. (Ĉirkaŭprenas sian patron.) Patro, mi ofte estis neobeema infano, sed pardonu al mi, en la nomo de la ĉiela amo, ĉion pardonu al mi. De nun mi promesas esti via obeema Lea ĉiam.

ZAKEO. Mia filino, bona infano vi ja ĉiam estis, krom en unu afero; sed en tiu tre obstina kaj kontraŭstarema. Vi komprenas?

LEA. Mi komprenas. Vi celas Joas'on, mian fianĉon.

JOAS (flanken). »Fianĉon». Tiun-ĉi vorton mi aŭdas unuan fojon el ŝia buŝo. Ŝia mensa ŝanĝiĝis.

LEA (kaptas la manon de Joas.) Joas, tute malinklina estis mia koro kontraŭ vi, tion mi konfesas; sed mi volas preĝpeti amon de ĉielo al mi, kaj kiel infano de la spirito de amo mi iam servos kaj honoros vin kiel via edzino. Aram, nun mi forgesos vin kaj alligos min al la sorto de Joas; ĉar tia estas la volo de mia patro. Se alimaniere mi farus, eble malĝojo entombigus tiun, kiu naskigis min kaj tiel ameme zorgis pri mi, lin mi eble mortigus antaŭ ol venis lia tempo, kaj min atingus la puno de alto. Sed se mi plenumas lian volon, farante pacon, la bonaj anĝeloj lokiĝos en mia ĉambro kaj fine portos mian animon en la sinon de Abrahamo. Pacon, repacigon mi volas fari; tiel ordonas la instruo de la Nazaretano, la instruo de la sendito de Dio. (Donas al Joas la alian manon.) Joas, jen via fianĉino.

ZAKEO. Tio-ĉi estas bone farita, mia infano, tute bele farita. Joas, vi estas nun fianĉo. Ĝi proponas al vi sian manon kaj koron.

JOAS. Estu salutata, dolĉa virgulino!

ZAKEO. Ĉu ŝi ne estas bonega infano?

JOAS. (Ĉirkaŭprenante ŝian kapon.) Oni ne povas tion nei (flanken). Oni devas forĝi dum la fero estas varma, forĝi kaj kaŝi ankoraŭ kun kia okulo mi rigardas viajn frenezecon. Sed jen, kiam vi foje estos mia laŭleĝa edzino, mi certe instruos vin iri en vojoj de ridindulo kaj aŭskulti la malbenindan instruon de tiu malsaĝa Galileano. Tamen, nun ordonas la saĝeco, ke mi obeigu mian animon ankoraŭ kelkan tempon, se eĉ bolas la galo. Sed sekvos ankoraŭ lego post la kanto, certe sekvos.

ZAKEO. Ĉu vi ree preĝis? Sed diru, ĉu ŝi ne estas bonega infano?

JOAS. Oni ne povas nei.

ZAKEO. La Nazaretano do bonon efikis, kaj ne malbonon.

JOAS. (Grincigante la dentojn.) Hm, hm. (Lea sin direktas al la patro.)

LEA. Mia kara patro! Bone faras li ĉion, ĉi tiu viro, malsanulojn li kuracas, por pekuloj li predikas gracon kaj por sklavoj eternan liberecon. Ho! mi ja vidis lian mirindan povon; ĝin mi vidis, kiam oni kondukis antaŭ lin viron, kiu estis muta kaj surda. Facile li tuŝis la viron, metante siajn fingrojn sur liajn orelojn kaj ekrigardis pie supren al la ĉielo. «Effatha» li diris, kaj tuj malfermiĝis liaj oreloj, la ligiloj de lia lango malstreĉiĝis

kaj klare li parolis por ĉies mirego. Per kia entuziasma dankemo la kuracito rigardis sian kuracinton, kaj per kia dia rideto turnis al li siajn okulon la filo de Nazareto, plenajn je amo! Kia solena momento, kiam la tuta popolo ĉirkaŭ ili ekploris! Ho! la anĝelo de Dia interligo nin proksimiris el la malalta dometo de Galileaj montoj sed el la kastelo de Dio lia animo malsupreniris. Kaj benata estu la ventro, kiu lin portis, benataj la manoj, kiuj lin luladis. Venis la akcepta tempo de Izraelo, leviĝis ĝia tago de savado. — Mia amata patro!

ZAKEO. Mirinde!

JOAS (flanken). Satano disrompis siajn katenojn kaj ekscitas nun la mondon.

ZAKEO. Diru, mia filino, kia estas la eksteraĵo de la viro.

LEA. Mia patro, kiel mi povus priskribi lin, la senditon de l' eterna mateno? Kiel tagiĝo brilas lia frunto klara, kaj kiel du matenaj steloj radias liaj okuloj, parolantaj pri mondo, kiu limojn ne havas. Ĉu al matena ruĝo mi komparu la ardantan oron de liaj lipoj, el kiuj spiradas pureco kaj sankteco. Mi ne scias, sed la bukloj sur liaj ŝultroj briladas kiel abundaj nuboj, kiel la belaj volvaĵoj de ombrecaj nuboj briladas sur la ŝultroj de Hermon. Li iradas vestita per simpla mantelo, teksita de Galileaj virinoj, kaj purpura rubando zonas lian maldikan talion. Ho! la solena alteco de lia figuro nin malsupren fleksas kaj la milda potenco de la sama figuro nin denove levas al la baskoj de lia mantelo. Kaj al tiu, kiu rigardas lian vizaĝon, li pruntedonas lumon el sia radibrilo, kiel al fonto donas lumon la disko

de la suno. Tiel, se li silente staras. Sed kiam malfermiĝas liaj lipoj, tiam sonas voĉo potenca kiel de Jehovo kaj tamen milda kiel la zumetado de vento en Salem. Tiel sonis lia voĉo kiam li predikis pri la regno de Dio (pie rigardante supren). Tien min iam konduku, favorkora spirito de l' ĉielo! Tien nin ĉiujn iam konduku!

JOAS (flanken). Vere. Satano iras libera kaj nun ekscitas la mondon en formo de anĝelo de lumo.

ZAKEO. Mia infano, rakontu al mi mallonge, kion li predikis.

JOAS (flanken). Jen, efektive!

LEA. Purecon de animo, ĉastecon de spirito li volas de ni kaj ke ni forpuŝu ĉiujn malbonajn kaj malpurajn pasiojn. Malamon kaj persekutadon li kondamnas kaj volas, ke ni amu ĉiujn, ĉiujn, tiel niajn malamikojn kiel niajn amikojn. Niajn malamikojn! rimarku tion, mia patro.

ZAKEO. Ami niajn malamikojn! — Tio estas io nova.

LEA. Sed nobla, ĉarma, ho ĉarma!

JOAS (flanken). Kurioza!

LEA. Ĉiujn li invitas al sia interligo, tiel la naciojn kiel la Izraelidojn, tiel la impostistojn kiel la gardantojn de l' templo li invitas al la ĉiela interligo.

JOAS (flanken). Ha, kia ĉiela intermikso!

LEA. Neniun li malŝatas, ne eĉ pekulon la plej grandan, kiu nur pentas kaj plibonigas sin. Novan sinceran animon li volas kaj jam tie-ĉi en la valo de zorgado li promesas trankvilon de konscienco kiel rekonpencon kaj puran ĝojon, sed fine post nia morto li donos al nia animo eternan savon en la sankta Ciono de Dio.

JOAS (flanken). Kurioze, vere amuze! Hej-ha, ĉiuj gefiloj de Ciono.

ZAKEO. Diru, kie vi disiĝis de la viro.

LEA. Nermalproksime de la urba pordego, al kiu li nun proksimiĝas.

ZAKEO. Mi volas lin vidi!

LEA. Rapidu lin renkonti!

JOAS. Kia sensencaĵo?

LEA. Mia bona patro, rapidu al li renkonte!

ZAKEO. Tuj, kaj sekvu min Ruben. Lin mi bezonas, ĉar mi estas en ega embaraso rilate miaj luantoj en mia dua domo. Ne tute volonte ili emas pagi la lupagon, sed nun mi iros por eldevigi ĝin el ili kaj mi plenumas do du aferojn per unu fojo, ĉar mia domo estas proksime de la urba pordego. — Mi volas vidi tiun viron!

JOAS. Haltu, bone pripensu!

ZAKEO. Kial vi tion volas?

JOAS. Tenu vin for de li, alie la kolera diablo konfuzos vian kapon.

ZAKEO. Ne timu, mia filo!

LEA. Joas, tiu-ĉi via parolo estas abomenaĵo por la ĉielo. Ho, mia fianĉo! Iru ankaŭ vi por vidi lin, kaj vi vidos, ke li ne estas diablo, sed la Mesio mem.

JOAS. Mesio! Haha! Kie estas do liaj legioj, lia flugilita rajdistaro, kie la fortoj, per kiuj li venkos la romanojn, ilin ĵetos malsupren en inferon kaj rekonstruos la kastelon de Davido? Pri ĉio-ĉi oni ne aŭdis, nek vidis.

LEA. Vi ne komprenas lian instruon. Ne per ekstera maniero, sed per potenco de sia spirito li savos la mondon.

JOAS. Kia malsaĝo!

LEA. Saĝo ĉiela!

JOAS. Lea, Lea, vi estas blindigita.

LEA. Vidinte la lumon de la mondo.

ZAKEO. Mi ankaŭ volas lin vidi. — Gardu bone nian domon, Lea mia, kaj precipe la kesteton tie, vi scias!

JOAS. Ankoraŭ unu fojon mi petegas vin: Tenu vin for de la danĝera homo!

ZAKEO. Mi iras, sed gardu vi mian fig. kaj balzam-ĝardenon. Ruben min sekvu. Restu en mia ĝardeno ĝis mi revenos, kaj tiun, kiu volas enŝoviĝi tra la barilo, batu sur la kapon, batu la friponon sur la kapon per via bastono. Sed vi, mia filino, memoru la karan kesteton tie. Venu Joas, kaj estu fidela gardanto (iras).

KVINA SCENO.

La antaŭaj krom ZAKEO.

JOAS (flanken). Ve, ke mi ne povas vin deteni! Ĉar mi antaŭsentas malbonon. (Iras.)

SESA SCENO.

LEA (sola).

Mia mizera patro, via orkesteto estas via kara mondo, kiu premas vin dum la tago kaj nokto. Doloriga estas la feliĉo de via riĉeco, se vi eĉ per mezurilo de justeco estus kolektinta viajn trezorojn. Sed mia patro, ĉu vi ĉiam uzis tiun mezurilon? Mi timas, ke ne, kaj mi timas la punon de ĉielo, kiu povas ŝanĝi en malbenon mian

doton kiam ni edziniĝos. De riĉa patro mi iros al riĉa edzo; sed mi kredas, ke ili ambaŭ havas kaŭzon rigardi per okuloj mallumigitaj de malĝojo la oran pesilon de honesteco kaj tiam eble malheliĝos la tago de ilia vivo. Ho! ilia trezoro estas abomenaĵo por mia animo. Sed ĝojon kaj trankvilon donas al mia koro la malriĉa Aram. Li amas Lea'n pro Lea kaj ne pro la oro de ŝia patro, kaj Lea lin amas kaj volus edziniĝi kun li, sed alia estas la patra volo. Ho! kiel maldolĉe disiĝi de vi, mia suno milda! Vin mi amas kvankam vi estas sadukeo, kaj ne kredas, ke ni mortas por vivi eterne. Sed eble vi tamen kredas, kvankam vi eĉ mem ne scias! eble vi dubas, junulo bela kaj nobla. Nobla vi estas kiel en Jeriĥo balzamarbo, kiu bruetas en la ĉiela alto, kaj bela vi estas. Ĉarme estas vin rigardi kiel la promesitan landon de sur la supro de Nebo. Tia vin imagas mia animo. Sed pli nobla, pli hela vi starus antaŭ mi, se vi kredus la ĉielan instruon el la buŝo de l' profeto de Nazareto. (Sidiĝas.) Ho! ne foriras el mia penso la mirinda homo, nek lia ekstera aspekto, nek la sono de lia voĉo; kaj kiel sankta fabelo restas en mia memoro la pasinta tago, la pasinta sendorma nokto. (Dormeme.) Al viaj piedoj, modeste ruĝiĝante, mia animo volas malleviĝi... malleviĝi kaj ekdormi... ekdormi por ŝonĝi sonĝon plej dolĉan. De tie komenciĝas la vojo de savo, la vojo de l' regno de Dio. Tien min konduku — — — konduku min tien, milda Goel! (ekdormas — Aram venas).

SEPA SCENO.

ARAM, LEA.

ARAM (flanken). Ŝi dormas, ŝi ripozas en trankvila dormo de senkulpeco. Belege la ĉarma vualo, formante multformajn blankajn nubetojn, kovras vian kapon, kaj ĉarme viaj nigraj bukloj serpentumas sub la blanka vualo. Via robo, similante ruĝantan veston de sovaĝa rozfloro, vin enfermas en sia delikata kovrilo, sed tamen ne kovras nek enfermas viajn brakojn de kubuto ĝis la rozecaj pintoj de viaj fingroj, sed nudigitaj ili brilas superante la neĝon heligatan de l' suno sur la altaĵoj de Libanono. — Tiu bildo min ravante tiras en la domon de impostisto, en la loĝejon de tiu viro, kiun malamas la judoj. Sed kial malamata, se li sian oficon plenumas honeste? Egoismaj kaj superstiĉaj estas la Izraelidoj. Sed mi, memorante vin, mia amata, volas rompi ĉiujn barojn, kiuj povus malheligi niajn interrilatojn. Al vi ĉiam, eĉ ĝis la nokto de Geheno, mi volas penegi, disbatante la malhelajn barojn de malhelpaĵoj. Lea, rigardante vin tie songantan, mi preskaŭ volus kredi, ke en vi estas senmorta animo. Ĉu mi kredu, ĉu pensu tiel? Troviĝas ja miriadoj apud kiuj la kreitaĵoj tute ne bezonas honti. Kie estas do la diferenco? Ĉu estas trovebla en la koro de homo la semo de ebleco, kiu levas lin senlime alte super la besto? Kion pensi? Kion kredi? — Mi ne scias, ne scias! Sed ravata mi rigardas la virgulinon tie, ravata kaj kun bruliga doloro, ĉar ŝi estas bela kiel serafimo, kaj eble jam morgaŭ estos propraĵo de Joas. Ha, kia turmenta penso, penso plena

je doloro! Ĉu li iam ripozos ĉe la brusto, kiu tie nun spiradas en trankvila feliĉo. Li! Vi dolĉe mordetanta vermo, disrompu jam la radikojn de l' koro ĉiujn! Ĉu li ĝuos la kapturnigan volupton de tiuj lipoj, la sanktan rozon de Saron. Sed, Joas, ha! mi ŝtelos la supran miel-rosan de via floro! (Kisas Lea'n, kiu vekigis — Aram malproksimiĝas de ŝi kelkajn paŝojn.)

LEA (leviĝas). Aram!

ARAM. Lea!

LEA. Aram, kion vi faris?

ARAM. Kion faris mi, Lea?

LEA. Kion sciis mi, kion sciis mi? Ho, ĉarmo ĉiela! — kion sciis mi?

ARAM. Kaj mi!

LEA. Silentu! Mi mizerulino ruĝiĝas kaj hontas kaj ree hontas kaj ruĝiĝas. Silentu, Aram, silentu! vi punon meritas!

ARAM. Punu min!

LEA. Pro Joas mi tion faros.

ARAM. Ĉu ne pro vi mem?*

LEA. Ve, mi malsaĝulino, mi vin riproĉas kaj samtempe dankas! Dankas? Ne pensu. Puni vin mi volas, puni. Ne kredu! ne kredu! Ve, kia multobla malsaĝeco! Sed vidu kia estas la virina naturo, vidu kaj ne miru. Aram, Aram, kial vi tiel agrable faris tiun-ĉi malbonan faron? Vekiĝo pro kiso de Aram estas dolĉa, dolĉa kiel la ĉiela manao, dolĉa kiel la ĉielo mem; sed tiel ne plu okazu, ne, ne, mia amiko, ne! Aram, aŭdu el mia buŝo maldolĉan vorton, por vi maldolĉan aŭdi, por mi eble ankoraŭ pli maldolĉan diri. Mia amiko, neniam plu

malfermu la pordon de ĉi tiu domo. Mi vin amas, sed via edzino mi ne fariĝos. Joas'on mi ne amas, sed lia edzino mi devas fariĝi; ĉar tia estas la volo de mia patro, kaj en la nomo de Dio mi ĝin plenumos. Sciu, li estas nun mia fianĉo. Al li mi promesis mian koron, mian vivon, kaj estaĵon tutan.

ARAM. Tio estas do decidita?

LEA. Por ĉiam.

ARAM. Kaj ne eĉ ĉerto da espero restas plu?

LEA. Ne, mia amiko. Sed estu konsolita, vi min baldaŭ forgesos kaj elektos al vi alian fianĉinon en la palmaroj de Jeriĥo.

ARAM. Nun estu mia tombo la fianĉino ĉe kies brusto mi min kuŝigos.

LEA. Aram, Aram kial vi furiozas?

ARAM. Kial mi plu vivos?

LEA. Pro la savo de via animo.

ARAM. Hm.

LEA. Ne forrifuzu, ne rifuzu nian ĉielan hejmon. Ĉar vi ja certe neniam estis forte konvinkita, ke vere tiel estas, kiel vi nun volas kredi, la aferoj de morto kaj vivo. Do ne staru kontenta en tiu-ĉi malhela nebulo, sed rigardu ĉiam pli malproksimen, kaj preĝu al nia ĉiela patro, ke li malfermu viajn okulojn vidi la lumon de lia graco. Iru, kaj aŭskultu la Nazaretanon, lian instruon aŭskultu. — Diru, kion vi opinias pri li?

ARAM. Viro mirinda, se li tia estas, kiel diras la famo.

LEA. Li predikas al ni la evangelion de savo, nin konsilas senĉese preĝi kaj promesas al ni fine la kronon

de venko. Li mem kvankam pura kaj nobla kiel la hela firmamento de alto, tamen ofte kaj fervore preĝas al nia patro, kies loĝejo estas en la ĉielo. Ĉu vi permesas ke mi rakontu kion vidis miaj okuloj hieraŭ, kiam subiris la bela tago?

ARAM. Mi aŭdos volonte.

LEA. Jen, kiam ni kune kun multnombra popolo venis al malsupro de alta monto, malaperis subite nia gasto el la lando de Galileo malaperis, kaj neniu sciis kien. Sed baldaŭ mi kaj miaj du akompanantinoj vidis lin suprenirantan laŭ la ombra deklivaĵo de l' monto en ŝirmo de malhelaj olivarboj. Tuj ni komencis vetante kaj rondirante kuri supren; fine ni atingis tre senspiraj la supron de la monto, kaj tie en ombro de densa cedro ni rigardis la dian homon kiu preĝis bela kaj glorita. Jen en la hela alto restis longe liaj belaj okuloj, kaj lia tuta estaĵo spiris seriozecon kaj piecon, jen li ree mallevis sian rigardon kontraŭ orientaj landoj kaj staris kaŝe ridetante kaj kvazaŭ songante sanktan songon. Kaj estis videblaj tie la valo de Jordano, la montoj de Gileado kiel blueta fumo kaj inter la montoj la urbo Rabat-Amono, sed ankoraŭ pli transe tute ĉe la horizonto, malklare videtiĝis la sabla flaveta lando Arabio. Tien li rigardis, sed ree levis la rigardon al brila alto kaj en liaj okuloj flamis plej dolĉa fajro, la frunto brilis kiel la pura ĉielo de festotago kaj de ĉirkaŭ liaj harbukloj — kiel ŝajni al ni, kiuj lin observadis, radiis lumo mirinda kaj hela, donanta antaŭsenton pri la gloro kaj brilo de sanktuloj. Tia ni vidis la homon sur la supro de l' altega monto. Kaj kiam li denove malsuprenpaŝis, sur lia vizaĝo

restis eterna paco. Tiel li foriris dum subiris la suno malantaŭ la altaĵojn de Efraïmo en la purpuran maron de vesperruĝo, kaj la cedroj kovriĝis en mallumo. Bela, solena estis tiu vido.

ARAM. Kara Lea, vere vi pentris por mia animo potencan bildon de preĝanta viro.

LEA. Tion-ĉi ne forgesu vi, kiu senlime furiozas, kiam renkontas vian koron malhelpaĵoj.

ARAM. Vi ja estis la plej granda trezoro de mia koro.

LEA. Sed heredo pli kara restas ankoraŭ por vi: ora trono en la eĥanta kolonsalono de Jehovo, kie sonas la harpoj de anĝeloj. Petegu, Aram, petegu forton por via animo.

ARAM. Vere! vi levis mian malesperigitan animon, tiel ke mi ankoraŭ unufojon volas levi mian frunton, kvankam nun prezentiĝas antaŭ mi la tago de mia vivo kiel dormanta sunbrilo de vespero en la valo de larmoj. Sed mia kruela sorto ja devigas min disiĝi de vi. Do, adiaŭ! (Prenas la manon de Lea.)

LEA. Ve, horo de malĝojo!

ARAM. Estu feliĉa!

LEA. Feliĉa sen vi! Ah!

ARAM. Vi ja staras forta en via kredo al la Nazaretano.

LEA. Ĉu vi serioze parolas?

ARAM. Neniel mi mokas.

LEA. Mi komprenas vian penson. Sed sciu, ni povas esti malfeliĉaj kaj tamen feliĉaj, en espero feliĉaj, kvankam suferas la koro dum pasas la horoj de tago. Feliĉa, feliĉa! kvankam via mano de adiaŭo elŝiras ĉiun.

florsukon el la vizaĝo de mia vivo, tiel ke kun mortpalaj vangoj staras mia feliĉo turnante siajn okulojn for de nuntempo, sed rigardante en la belegan malproksiman estontecon. Feliĉa! Per okulo plena je ĝojo de espero mi celadas la ĉielrandon migrante tra la kardkovrita tero. — Adiaŭ, mia amiko!

ARAM. Adiaŭ! Mi foriras.

LEA. Ankoraŭ momenton restu.

ARAM. Post momento via patro estos ĉi tie.

LEA. Li ankoraŭ restos momenton.

ARAM. Joas ĉirkaŭiras tie-ĉi kiel hundo.

LEA. Li estas mia mizera estonta edzo.

ARAM. Mi forgesis.

LEA. Adiaŭ, adiaŭ!

ARAM. Jes, kaj ni disiĝu.

LEA. Permesu al mi ankoraŭ mallongan tempon revii sur via brusto, nur mallongan, ne pli longe ol unu fojon enspiras la kamelo. (Apogas sin kontraŭ la brusto de Aram.) Aram, kedu al Kristo ĉar li estas Mesio de Izraelo. Kedu al li kaj vi estos feliĉa. Aram! (Silento — Joas venas el la fundo.)

OKA SCENO.

La antaŭaj, JOAS.

JOAS (flanken). Ha! kia satana vido! (Laŭte.) Malbeno! (Lea ektimiĝas kaj lasas Aram'on ekkriante.) Falu la fajra sago de Cebaot!

LEA. Joas, auskultu min!

JOAS. For, ruza serpento, for!

ARAM. Pli kviete!

JOAS. Ĉu pli kviete? Jes vere! Ĉu vi admonegas, min kviete ĉion ĉi engluti, vi diablo? Disbategu mia bastono vian kondamnitan kapon! (Minacas lin per sia bastono.)

LEA. Joas, Joas!

JOAS. Mortu kaj vin manĝu la korvoj!

ARAM. (Lin detenas.) Mi ne tre volas akcepti batojn de via bastono. Bridu vian humoron, vi kurba-krura fariseo!

LEA. Ve al ni, ve!

JOAS. For viaj malbenitaj ungoj de la pura korpo de pia filo de Abrahamo! Delasu, vi malbenito!

LEA. Aram! Joas! Mi petegas vin. (Zakeo kaj Ruben venas kaj disigas la batalantojn.)

NAŬA SCENO.

La antaŭaj. ZAKEO. RUBEN.

ZAKEO. Kion ĉi-tio signifas? Kial interbatigo en mia pacigita domo? Disiĝu kaj kvietiĝu vi mizeraj infanoj de malamo! Nun, silentu Joas! Ha! se estus mi la sama, kiel ĵus antaŭ ol mi foriris de tie-ĉi, mi vin ŝetegus eksteren kaj baldaŭ vi ruliĝus tie sur la ŝtona placo. Sed nun — dank al Dio — nun mi bedaŭras vin en potenco de via kolerego. Joas, Joas, sufoku vian koleron; ĉar via vizaĝo pala kaj besta nin teruras. Vi ja spiregas kiel drako kraĉanta venenon. Joas!

JOAS. Ĉu — — — ĉu mi ne havas kaŭzon! Ha! Sciu, mia kolero estas justa.

ZAKEO. Mia filo, kolero neniam tie-ĉi estas justa. Sed rakontu, kian maljuston kaj ofendon vi suferis. Diru, kio kaŭzis la tumulton, kaj diru la veron, ke mi povu juĝi juste.

LEA. Mia bona patro . . .

JOAS. Permesu al mi, knabino, diri la veron unue. Mi ja estas la kulpiganto, mi la ofendito.

ZAKEO. Diru.

JOAS. Sed venis la horo de mia oka preĝo, kaj gloro al Jehovo super ĉiuj. (Genufleksas kaj preĝas.) Ho, Sinjoro, Dio de Abrahamo, Dio de Isako, Dio de Jakobo, aŭskultu min! Gardu min ĉiam de malpureco de sadukeoj, de tiu lepra malsano, kiu nin brulstampas kiel certan kaptajon de infero kaj nin fine malsuprenigas en la fajran fornegon! De tia koto de l' pekoj min gardu, vi fonto de ĉia lumo! Ho! aŭskultu min! Mi fastas kiel ordonas la leĝo de niaj patroj; mi senĉese al vi preĝas kaj servas. Tial aŭskultu min, helpu min, kaj fine kiam alvenis mia horo, konduku min en la domon de viaj sanktuloj! Tiel faru; sed humiligu miajn ruzajn subpremantojn, kiuj kiel leonoj blekegantaj sekvas sur miaj postsignoj penante min forgluti. Sed bruligu iliajn korpojn kaj animojn per la fajro de via kolerego en la eterna mallumo! Aŭskultu min, Sinjoro, Sinjoro, aŭskultu min la potenca Dio de niaj patroj! Amen. (Leviĝas.)

ZAKEO. Sed pro kio vi volas plendi?

JOAS. Mi demandas vin: ĉu vi iam promesis vian filinon kiel edzinon al Joas?

ZAKEO. Tion mi faris, kaj je mia vorto mi restas ankoraŭ.

JOAS. Bone! Mi demandas vin, Lea: ĉu vi iam promesis vian koron al Joas?

LEA. Antaŭ momento mi tion serioze promesis.

JOAS. Kaj propravole?

LEA. Vere.

JOAS. Ni do estas gefianĉoj?

LEA. Jes, tiel estas.

JOAS. Sed per tio vi ja eldiris vian propran juĝon, knabineto.

LEA. Patro, vere mi ankoraŭ unu fojon volis apogi min al lia brusto ... (Joas ŝin interrompas per brua tusado.)

JOAS. En nomo de Dio kaj ĉielo! aŭdu, kion vidis miaj okuloj, kiam mi eniris el la balzamĝardeno. Ho! en la plej dolĉa, en vere Babilone volupta amindumado ili staris ĉi-tie brusto kontraŭ brusto ĉirkaŭprenante kaj -brakante. Se tio ĉi ne estas vera, krevu la tero sub miaj piedoj kaj kiel veziketo malaperu Joas!

ZAKEO. Granda Abrahamo! Ĉu mi devas kredi tian perfidecon ĉe mia infano? Ĉu vi estas tiel facilanima kaj ŝanĝema filino? Ĉu tio-ĉi estas vero?

LEA. Mi apogis min al lia brusto, tio estas vero, sed de trompo mia koro estis malproksime, kvankam estis maldolĉa la horo de disiĝo. Jes, horo de disiĝo ĝi estis, kaj tial ankoraŭ unu fojon mi volis premi mian frunton kontraŭ lia brusto, kaj poste disiĝi de li por ĉiam. Tia estis la afero, nek pli nek malpli granda.

JOAS. Ho, mia knabineto! se ni nur povus kredi la vorton de virino, parolon de ruza filino de Eva.

ZAKEO. Mia filino, mi kredas vin kaj mia animo ree akiris trankvilon. (Al Aram.) Tamen, mi volas ankaŭ iom demandadi vin, junulo.

JOAS. Demandi lin, ĉu tio ankoraŭ! Oni ŝetu lin eksteren tiel ke la kruroj kraku. Jam li estas sufiĉe kulpa pro tio, ke li troviĝas en via domo malgraŭ via plej severa malpermeso.

ZAKEO. Aram, mi esperas, ke mi aŭdos veron de viaj lipoj.

ARAM. La veron diris al vi via filino. — Kiam vi foriris mi rapidis en vian domon, malgraŭ via malpermeso, ĉar perforte min tiris al ĝi la bildo de bela virgulino en mia koro, la arda kaj milda brilo de tiu bruna okulo. — Sed nun vi tamen vidas min lastan fojon tie-ĉi, kiam mi scias, ke ĉiu espero perdiĝis, ĉar Lea ja mem propravole proponis sian manon al Joas, kaj do ili estas gefianĉoj. Tion-ĉi ŝi al mi tuj konfesis, malpermesante al mi plu ravigi ŝian koron kaj kore petante, ke mi ne plu malfermu la pordon de tiu-ĉi domo. Mi promesis kion ŝi petis, promesis, kun malluma funebro de l' nokto sur mia vizaĝo. Tiam ŝi komencis dolĉe konsoli min, kaj mi certigis al ŝi fine, ke mi trankvile renkontas mian sorton, kaj etendis al ŝi la manon por adiaŭo. Sed tiam ŝi volis ankoraŭ unu fojon apogi sin al mia brusto kaj mi tion permesis; ĉar tio estis dolĉe kaj mi ne konsideris tion kulpo. Tie ŝi ripozis, kiam senbrue, kvazaŭ ombro, alproksimiĝas la kolera Joas minacante per bastono. Mi decidiĝis defendi, kaj pro tio la tumulto, kiun vi mem rapidis interrompi. (Zakeo prenas la manon de Aram.)

ZAKEO. Saluton al vi, kiu tiel noble klinas vin laŭ la volo de Sinjoro! Sed tamen mi diras al vi: forgesu tiun-ĉi domon kaj ankaŭ evitu la alian domon, kie baldaŭ mia Lea kiel mastrino okupiĝados, ĉar via ĉeesto nur kaŭzos tenton en la familia vivo de mia filino. Ni disiĝu nun, sed ni disiĝu kiel amikoj, en la nomo de ĉielo ni disiĝu tiel! Tamen: ne foriru ankoraŭ sed restu momenton, vidu kaj kun mi ĝoju; ĉar hodiaŭ venis savo al la domo de Zakeo. — Ho, Ruben, ĉu vi ne diras same?

RUBEN. Jes, nun Ruben, kiel lia mastro, pensas pri la mondo alie ol en komenco de ĉi tiu tago. Granda estas la graco de Sinjoro Cebaot!

ZAKEO. Granda ĉiam! Bone al ni, ke ni vidis la estron de paco kaj aŭdis el lia buŝo informon pri la ĉielo de l' ĉielo. Tial nun fluas el miaj okuloj larmoj de infano. (Kovras sian vizaĝon.)

JOAS (flanken). Kion signifas ĉi tio?

LEA (proksimiĝas al sia patro). Mia patro, sankta antaŭsento igas mian koron tremi. Ĉu estas tiel, kiel mi sekrete esperas? Diru: kial vi ploras?

ZAKEO. Reganto de supera alto, kiu estas mi, ke vi min memoras? En polvo rampanta vermo, kaj tamen via infano. Antaŭ momento mi mizerulo rampis sub ŝarĝego de mamono kaj ĉirkaŭ mi estis maltrankvila nokto; nun mi kuraĝas levi la rigardon, kaj malfermita estas antaŭ mi la ĉielo, malfermita la sino de patro Abrahamo!

LEA. Eija! mia patro elektis la plej bonan parton, paŝis en la vojon de piulo. Eija! nun sonu la harpoj kaj

flutoj, pro ĝojbruo tremu la fundamentoj ĉiuj, kaj per sankta fumo kaj odoro nun pleniĝu nia domo kiel antaŭe dum la jubilea festo de l' profeto Jesajo. Ni ĝojegu! Ĝoju, Joas, mia kara!

JOAS (tusas brue). Silentu, virino, silentu!

LEA. Ĝoju kun ni en la tago de feliĉego! (Falas en la brakojn de sia patro.) Salutata, paĉjo, estu salutata! Ho Aram! forĵetu la malĝojan rigardon kaj lasu vian animon flugi ĝis la hejmo de fulmoj. Nun la ondo de ĝoj-ventego alten moviĝu, leviĝu ondo sur ŝultrojn de ondo por kisi la flugilojn de ora nuboj kaj kvietiĝu la ventego ree, fariĝu ĝi la trankvila maro de l' paco en kies profundo sin spegulos la sankta, arkefleksa ĉielo. — Sed rakontu, patro, rakontu, kiel okazis al vi tiu-ĉi feliĉo.

ZAKEO. Karega filino, kun ĝojo mi tion faras. Potenca estis la momento, eterne potenca kaj bela. — Ĉe la urba pordego mi staris proksime de mia domo, kaj la homamaso, kiel solene bruanta rivero, alproksimiĝis al ni, kaj meze de ĝi la viro el Galileo. Sed ĉar la multnombreco de l' popolo malhelpis min atingi la vojon, mi supreniris en arbon esperanta vidi lin de tie. Varmege brilis la suno kaj pura kaj blua sin arke etendis la ĉielo super la montaj altaĵoj. Li fine aperis irante sur la sabla vojo inter la ruĝa ŝtonego kaj la malnova palmo. — Li venis: juna viro, vestita per flirtanta mantelo, alproksimiĝis kun vizaĝo pala kaj la brunaj bukloj kovris liajn ŝultrojn. Tiel li alproksimiĝis kaj entuziasme lin sekvis la okuloj de la popolo. Sed nun li ekvidis la viron en la arbo, suprenrigardis kaj mi sentis kvazaŭ sankta

ondo min trafluis. Milda estis tiu-ĉi rigardo sed serioza kaj plena je alta nobleco, kaj akre brilanta kiel sunbrilo, reflektata de la hela surfaco de spegulo. »Zakeo» li diris, »malsupreniru, ĉar hodiaŭ mi devas loĝi en via domo». Volonte, kvankam tre mirigita mi rapidis malsupreniri, ĝoja li iris kun mi kaj eniris en mian domon; en la domon de impostisto! Kia honoro!

JOAS. Honoro?

ZAKEO. Honoro granda, sed ankoraŭ pli granda feliĉo, feliĉo ĉiela! Rapide mi pretigis manĝaĵon, kiun ni frate kune manĝis: li, liaj disĉiploj, Ruben kaj mi. Sed dum la manĝado, kia sankta kaj alta instruo el lia buŝo eliris, per flugiloj de plej ĉarma voĉo portita al mia orelo! Li predikis pri la kompatema Dio de l' amo, kiu ne volas la morton eĉ de la plej granda pekulo tie ĉi, nek la pereon de la plej malbona homo, sed volas lin returni, resanigi kaj purigi por akcepti lin kiel sian propran ifanon. Fastado kaj la ekstera klopodo de preĝo estas vantaĵo antaŭ li, sed purecon, purecon de l'animo li postulas de ni. Kaj al ĉiuj sur la tero kiuj kun sincera koro tie-ĉi iradas konfesante nur Dion en la supera alto, al ili ĉiuj li promesas eternan feliĉon. — Tiel li instruis kaj lian instruon mi atente aŭskultis inter la piaj viroj. Mia koro tremetadis, varmiĝis kaj fine ekflamis per ĉion venkanta brulo. Supren, tra la larmofluo de miaj okuloj mi rigardis al la sankta viro kaj li alrigardis min kiel la hela ĉielo nin alrigardas de rando de pluvanta nuboj, sendante la lumon de l' espero. Tiel li rigardis kaj liaj vangoj ardis kiel brulanta karbo. Tiam min kaptis la ĉiopova spirito de Dio, mi stariĝis, atestis lin

Mesio, promesis kredi al li kaj per lia forto porti fruktojn de justeco. Kaj kion mi ankoraŭ promesis? — Tion vidu propraokule, plej karaj amikoj. (Foriras por alporti la kesteton.)

LEA. Laŭdo al Jenovo, laŭdo kaj gloro!

JOAS (flanken). Hmk! Kion li volas de sia kesteto? (Zakeo alportis sian kesteton sur la tablon.)

ZAKEO. Nun, mia filino, ne ruĝiĝu, kiam vi aŭdos la veron, sed rigardu noble en la mondon. Do aŭdu: La plej granda parto de tiu-ĉi mia trezoro estas maljuste kolektita.

LEA. Tial forĵetu la ŝarĝon de via brusto, ĝi malsupreniĝu en la monkeston de malriĉuloj.

ZAKEO. Ĝuste dirita! — Joas, ne ruĝiĝu, en la nomo de Dio, ne ruĝiĝu.

JOAS. Zakeo! Vin retenu, homo, vin retenu pro Dio!

ZAKEO. Ĝuste al Dio mi plenumas mian promeson nun, oferante la trezoron por malriĉuloj kaj ĉiuj, kiuj per mi suferis maljuston; ĉar pli kara ol la trezoroj de la tuta mondo, estas mia animo. Nun, mia kesteto, mia animo estas pli ĝoja, kiam mi disiĝas de vi, ol iam antaŭe, kiam mi vin plenigis. Ruben, vi ĉiam fidela Ruben, prenu la monon, kalkulu tuj la duonon de ĝi por malriĉuloj, okdek denarojn por la vidvino en Gilgalo kaj kvardek por la viro en Bet-Haramo kaj ankoraŭ por multaj aliaj...

JOAS. Ĉesu, vi frenezuloj! Jam ĉesu!

ZAKEO. Ne malhelpu! — Jes; kaj por multaj aliaj laŭ tio, kiom mi rememoros la viktimojn de mia trompado; kaj tiuj kiujn mi ne plu memoros, ili alpaŝu, atestante

pri miaj faroj, kaj mi repagos kvaroble, kiel ordonas la leĝo de Moseo. Ĉion, ĉion mi volas pagi al ili tiel longe kiel restas ia havaĵo en mia kesteto. Kaj kiam ĝi estos malplena — kaj tio baldaŭ okazos — ili ne ĉesu esperi, sed atendu ĝis kiam mi repagos el miaj estontaj rimedoj miajn ŝuldojn. Tia estis mia promeso al la profeto de Galileo kaj nun mi ĝin plenumas. — Do, mi estis riĉa, sed nun mi estas malriĉa kaj tamen pli riĉa ol iam antaŭe. Benata estu la nomo de l' Sinjoro!

LEA. Benata, laŭdata en tiu-ĉi momento belega.

ZAKEO. Prenu la kesteton kaj faru mian volon.

RUBEN. Ke tiel okazos, tion sciu, sinjoro!

ZAKEO. Mi konas vin. Iru kaj faru kiel mi diris. (Ruben ekiras, sed Joas kaptas la kesteton kaj malhelpas lian iron.)

JOAS. Haltu viro, haltu!

RUBEN. Kion vi intencas?

JOAS (premas la kesteton furioze kontraŭ sia brusto). For de mia kesteto! La trezoroj estas miaj, miaj, miaj ili estas! Por mi ili estas destinitaj, sankte promesitaj, kaj tio estas vera vero. For!

RUBEN. Forlasu, vi sovaĝulo, kaj lasu min iri! (Joas kaj Ruben ambaŭ volas tiri la kesteton al si.)

ZAKEO. Joas, Joas, ĉu vi estas freneza?

LEA. Joas, ne ekbruligu la koleron de mia patrol

JOAS. La doto, la doto, ha!

RUBEN. Iru al inferol

JOAS. Min helpu, bonaj najbaroj kaj civitanoj. Zakeo perdis sian prudenton kaj ne scias, kion li faras. Rapidu, rapidu por helpi!

ZAKEO. Vi igas mian koron ĉagrenŝveliĝi.

JOAS. Li ne scias kion li faras!

LEA. Li plenumas faron agrablan antaŭ Dio kaj homoj.

JOAS. La oro estas mia!

RUBEN. Vi mensogas!

JOAS. Mia tute vere!

ZAKEO. Kion? (Kaptas la brakon de Joas kaj ŝetas lin kolere flanken.) Foriru, spirito de tentol!

LEA. Dankon, mia patro! (Ruben forportas la kesteton.)

ZAKEO. Ĉi tie fariĝos mia volo, kaj ne la via.

LEA. Dankon mia patro, dankon! — Sed kion parolas mi? Ne la lingvon de paco kaj konkordo. Tamen: pardonu, kara Joas, la parolon en kiu ekmontriĝis la antaŭa menso de Lea, kiu ĝojas je malfeliĉo de alia. Sed ŝi petas, ke vi tion denove forgesu. — Tiel agis mia patro kontraŭ vi ĉar alie li ne povis agi, ne montrante malafablecon. Sciu, ke malfermiĝis liaj okuloj por vidi, kian belegan faron de justeco li nun plenumas per sia riĉaĵo, faron pro kiu ĝojas Dio kaj la anĝeloj. Tion diros iam ankaŭ vi, aŭdinte la instruon de l' ĉielo, kiu estas la evangelio de repaciĝo kaj amo.

JOAS. Satano alnajlu vian langon, aliformigu vin eĉ en salan kolonon! Por mi estas tute egale. Ĉu mi edziĝus kun la filino de tiu-ĉi granda malbonfaranto, procentegisto kaj ŝtelisto? De tio gardu min favora Elokim. Jen mia vorto.

LEA (flanken). Kia ĉarma vorto!

JOAS. Procentegisto kaj ŝtelisto, tion li mem konfesis.



ZAKEO. Kaj tamen post ĉi tiu konfeso vi ankoraŭ tute ame premis mian oron al via koro. Kion pensi pri tio?

JOAS. Pensu kion vi volas. Vian filinon mi lasas al diablo!

LEA. Mi dankas vin Joas, ĉar vi min liberigas el tiuj-ĉi malvarmaj katenoj. Vin mi dankas, kun varmaj larmoj de ĝojo en miaj okuloj, dankas vin pro tio, ke malfermiĝas jam ĉi tie antaŭ malforta virgulino la mondo de libereco. Kia ora tago!

ZAKEO. Donu Dio, ke Joas, pligrandigante sian riĉaĵon ankoraŭ ne atingis Zakeon en uzado de malpermesataj rimedoj, tion donu Dio! Vero! maljuste mi agis, sed tiel, eble eĉ pli arogante oni agis tie-ĉi jam de malproksima estinteco. Tamen tio-ĉi neniel min defendas, nek antaŭ Dio nek antaŭ homoj. Nur pentado kaj oferado de ĉi-tiu juste aŭ maljuste kolektita oro povas reŝanĝi la jam faritan en nefaritan, kaj doni al mia amino trankvilon. Kaj tiel okazos hodiaŭ, en tiu-ĉi momento per la senfina graco kaj potenco de l' ĉielo. Kaj faris, Dio scias, ĉi-tiu tago multmaniere feliĉan faron. Ĝi kiel fortega ŝetilo jam en bona tempo forigis el mia parencaro danĝeran kardon, kiu volis enradikiĝi en la kampon estintecan de mia filino. Hodiaŭa tago klare montris, ke nur la trezoroj kaj oro de mia domo estis tiu fianĉino, al kiu aspiris Joas trans la koro de Lea per malpuraj paŝoj. Sed hodiaŭ li montris sian ĝustan haŭton. Li nun, kiam la riĉaĵoj de Zakeo forpasis, forlasas la malriĉan impostiston kaj lian filinon. Sed ĉio estas bone.

LEA. Ah! tiu-ĉi forlaso estas feliĉo por ni.

ZAKEO. Tion mi scias. Lin vi ne amas sed Aram'on Tamen ne plu turnu viajn okulojn eĉ al li; ĉar vi estas nun filino de malriĉulo. Jes, nun oni vidos, kio klinis la korojn de knaboj al mia domo. Ĉu estis ĝi amo? Ĉu estis ĝi avido? Vi, mia kompatinda infanino, estas nun la provilo kiu montros, el kia metalo estas iliaj koroj.

ARAM. Ŝi estas la multekosta ŝtono, kiun ĉiam mia animo posedi deziras. Ho, se ŝin mi ekposedus, en la profundon de mia koro mi ŝin kaŝus!

ZAKEO. Jen ŝi estas! klinu vin al lia brusto, mia Lea, kaj estu lia por ĉiam. (Ŝin tiras al Aram.)

LEA. Mia patro plej kara! (Apogas sin kontraŭ la brusto de Aram.) Aram, vi ĉarma!

ARAM. Lea, la kreantino de mia feliĉo!

LEA. Kiel? Ĉu mi ripozas kontraŭ via brusto kiel via propra amatino?

ARAM. Ripozu, eterne tie ripozu!

LEA. Mi eĉ ne kredas mian feliĉon, kaj tamen mi scias, ke ĝi estas vero. Kia ĉarmego, kia kapturniga bonodoro el la sankta festo de la tendoj.

ARAM. La festo de niaj koroj!

ZAKEO. La junulino meritas vin kaj ankaŭ vi ŝin, kvankam perdiĝas la rigardo de via animo en la nigran teron.

ARAM. En la teron? Malĝuste kredite, tute malĝuste! Mi kredas ke tiu-ĉi Nazaretano estas la elektito de Dio; kaj sciu ke mi parolas el la sincereco de mia koro. Ho! mi ne hipokritas, ne hipokritas, kiel trompema fripono. Kial mi tiel farus? Lea ja estis mia jam antaŭ ol mi tion-ĉi konfesis. — Jes, mi kredas al li.

ZAKEO. Ni ĝojegu!

LEA. Duoble ni ĝojegu!

ARAM. Vidu, jen estas la potenca Mesio de Izraelo. — Kion mi konsideras la plej granda miraklo ĉi tie? Tion, ke avarulo forĵetas sian tutan riĉaĵon kiel malpuran koton. Tion ne povas fari homa forto.

ZAKEO. Vere ne! La graco de Dio tie faris sian miraklon.

ARAM. Tamen, kiu forigis el miaj okuloj la nebulon de blindeco? Salutata vi estu, mia karega belega Lea! El via estaĵo fluis al mi sankta lumo ĉe kies brilo la okulo de mia spirito penetris profunden en la regionon de Dio.

ZAKEO. Selam, mia infano, selam! Vi ebligis al mi vidi la sunon de mia savo. Lin mi vidis kaj eternan pacon ricevis.

LEA. Lin mi vidis kaj ĉion ĉi mi ricevis. Nun ni ĉiuj ja apartenas al la ŝafaro de la ĝusta paŝtisto, kaj mi mem, mi estas la gaja, gaja, ora ŝafidino de Aram! Ho ĉarma vespero! Mia animo ĝojdancas kvazaŭ ĉe sonado de mil cimbaloj, ĝojdancas kaj tremetadas kiel murmuretas la figarbaro. Ni aŭskultu... ni aŭskultu la mallaŭtan bruetadon, kiel antaŭe la zumetado de la vento de Elijo kiu alportis la Eternulon. Ho! Kiam mi vidis vesperon tiel ĉarman? Se mi ĝin iam vidis, mi estis tiam eta infano. Ekstere tie, transe de la muroj de l' urbo, mi restis en somertago, ludante en la palmaro. Malsupren 'aŭ la ĉiela firmamento malleviĝis la brilanta suneto el la oraj belnuboj de l' okcidento, kaj la sudokcidenta vento blovetis ĉarme,

blovetis kaj bruetadis en la suproj de la palmoj. En ilia ombro mi saltetadis kaj ludadis, gaja knabineto, kiam eksonis al miaj oreloj voĉo tra la milda karesanta fluo de l' vento, vokante: Lea, Lea kaj ree Lea. Kiu vokadis tie? Kies estis la dolĉe sonoranta voĉo? Ho, tiam la fratino mildkora de mia patrino, virino nigrabukla kaj ardanta kiel ruĝanta rozo alproksimiĝis, vokante sian plej amatan infanon. Ŝi venis, min envolvis en sian mantelon kaj diris: rapidu jam hejmen, kun mi rapidu, karulino, tie gastoj el la urbo Mahanaim en nia domo amuziĝas, kaj vin deziras ili vidi, ĉirkaupreni kaj kisi. Venu mia infaneto, venu! Tiel ŝi diris, portante min en la ŝirmo de sia mantelo kontraŭ la freŝa, dolĉa venteto, kaj vidiĝis fine la kara domo. Ni eniris, kaj de la sankta odoro de folioj pleniĝis la ĉambro en la sabata vespero. Eniris ni, kaj ridetante etendis kontraŭ mi la brakojn la ĉarmaj gastoj el Mahanaim, kaj nun de brako al brako mi estis portata kiel ora burĝono. Kiel birdeto karese portata mi nun ĉirkaŭiris de la ŝirmantaj brakoj de l' virinoj al la brustoj de l' viroj en ĉarma rondo, ĝis mi fine denove ripozis en la mildaj brakoj de mia portantino. Tie mi feliĉega ripozis kaj rigardis tra la fenestro al la fora okcidento kaj vidis tie la flamon estingiĝantan, de l' suno kiu sankte ridetante malleviĝis post la brilantajn montojn. Jen kia la plej bela tago de mia infanaĝo. Ho, kun ĝi mi volas kompari tiun ĉi tagon.

ZAKEO. Ho, mia infano, ho kara animo! Kia koro batadas en via brusto! Mi sentas senliman ĝojon, rigardante la flamon, kiu brilas kontraŭ ni el viaj okuloj, agrable varmigante. Aram, aŭdu min. Aram! (Tenante

la manon de Lea.) Tiŭ-ĉi infano al vi portas eternan feliĉon.

ARAM (kaptas la alian manon de Lea.) Ĝin ŝi alportos, kaj tial mi povas min nomi feliĉulo.

LEA. Ĉio bona al ni estas donata de supre. — Sed ni ĝoju!

ARAM. Ni ĝojegu. Joas, mi scias, ke vi ne volas kun ni ĝoji, ke vi pli volonte vin forigas de ni.

JOAS (flanken). Jes; kial mi staras ĉi tie kaj rigardegas, mi frenezulo? (Laŭte.) Mi forrapidos de vi kaj lasos al vi malbenon. Vidu, la puno de Jehovo. Eniru en vin la blekeganta aro de diabloj, la bruliga pesto kaj lepro, kiu eluzas kaj manĝas ĝis la ostoj! (Per laŭta murmureganta voĉo kaj klakante per la bastono kontraŭ la planko.) Ĝis la ostoj, ĝis la ostoj! Ha!

ZAKEO. Sed estu feliĉa vi!

LEA. Gaja kaj feliĉa ĉiam, nia frato kara!

ARAM. Feliĉa kaj fine mortinte savita!

JOAS (mirigita). Kion?

ARAM. Feliĉon al vi mi deziras, el tuta mia koro mi ĝin deziras.

LEA. Kiel la milda pluvo de somero alfluu feliĉo kaj paco al vi kaj fine la brilo de gloro Dia!

ZAKEO. Noble dirite, mia filino! Ho! via nobla animo nin levas de la polvo tera al alteco de ĉielo! — Jes, feliĉo, savo kaj paco estu fine nia heredo, ĉies heredo, ĉies! (Ĉirkaŭprenas Lea'n kaj Aram'on. Joas foriras tre penseme kaj kun la mano sur la frunto.)

NOTETO.

Ĉi tiuj teatraĵoj, per si mem tre karakterizaj al la verkinto, estas publikigataj ĉefe pro tio, ke ili estas facile prezentebaj en esperantistaj festoj. Krom tio La fianĉiĝo estas prezentata dum la Finnlanda Foiro en 1920, kaj ŝajnis al ni utile havigi al la publiko la tekstlibron. La laste nomita, komedio tre ŝatata de la finna publiko, ne estu tro severe kritikata de la leganto, al kiu ĝi eble ŝajnas ne sufiĉe interesa; ĝi devas esti vidata sur la scenejo,

La biografion de la verkinto oni trovas en numero 2. de la sama biblioteko.

La eldoninto.

Finna Biblioteko Esperanta.

N:o 1. JOHANNES LINNANKOSKI
Batalo pri la domo Heikkilä.

Novelo, perlo el la moderna finna literaturo. Kun biografio de la verkinto. 60 paĝoj. Fmk. 3: —.

N:o 2. ALEKSIS KIVI
La botistoj.

Majstra komedio de klasika finna verkisto. Kun biografio de la verkinto. 142 paĝoj. Fmk. 5: 50.

N:o 3. ALEKSIS KIVI
La fianĉigo. Lea.

Du teatraĵoj facile ludeblaj, tre ŝatataj de la finna publiko. Fmk. 4: —.

Riceveblaj ĉe

Esperanto-Oficejo Finnlanda, Helsinki,
kaj ĉe

Eldona akcia societo Otava.



20
17 July 1913

